

# KATALUNA ESPERANTISTO\*

\*Llengua internacional i drets lingüístics

---

NUMERO 353-354  
(119-120)  
KVINA EPOKO  
JANUARO-JUNIO 2010

---

- > Internaciisme en Reus
- > Verko vojmontra
- > En socia forumo
- > Kunagado en Valencio
- > Muzeo de Esperanto de Subirats
- > Ponto inter hindeŭropaj lingvoj
- > Almagro aŭ la plezuro esti gastigita

- 
- > La diversitat lingüística i la pau
  - > Els caràites

---

ESPERANTO\*  
CAT

\*Asociació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

## LA DIVERSITAT LINGÜÍSTICA I LA PAU<sup>1</sup>

Fèlix Martí<sup>2</sup>

*Sobre el tema de la diversitat lingüística i la pau, em sembla que la bona notícia és que hi ha una aspiració generalitzada i progressiva cap a la vida democràtica en tots els continents. I aquesta qüestió fa emergir els conflictes identitaris, perquè si es dona veu a la gent, la gent es reconeix segons el que és: reconeix la seva identitat i aspira a un reconeixement de la seva identitat. I aquí, en aquesta aspiració del reconeixement de la identitat, hi apareix d'una manera claríssima l'aspiració a la reivindicació lingüística. I per tant, en la majoria de conflictes que tenen lloc avui dia en el món fàcilment hi descobrim els components lingüístics. Moltes vegades no és que les comunitats lingüístiques com a tals lluitin o provoquin la violència –de fet, la violència, normalment la provoquen els estats que reprimeixen la diversitat lingüística. Però, en tot cas, el que em sembla interessant, és tenir aquesta capacitat de descobrir els components lingüístics que estan presents en tots els conflictes actuals. En uns de manera més clara i en altres d'una manera més secundària.*

Pàgines 15 a 18

- 
1. Parlament pronunciat en el Cicle de Col·loquis "Llengües, diversitat i pau", el 30 de novembre de 2008 a Sabadell. Transcripció de Víctor Solé.
  2. President honorari del Centre Unesco de Catalunya i president d'honor de Linguapax



JOSEP MARIA SERRANO



## BONA GLORO PLI VALORAS OL ORO

Ĉi-jare nia asocio celebras sian jarcenton. Antaŭ 30 jaroj naskiĝis Kataluna Esperanto-Asocio kiel posteulo de Kataluna Esperantista Federacio fondiĝinta la jaron 1910. Ni kreis emblemon de la evento kaj ni planas celebri la jubileon ĉi-aŭtune en Sabadell per solenaĵo. Sed la plej bona celebrilo de la datreveno estas sendube la publikigo de la lasta libro pri la historio de Esperanto en la Kataluna Landaro, pri kiu vi trovos recenzon sur paĝo 4.

Jubileo, tamen, ne elstaras pro videbla brileco. En la pasinta numero de *Kataluna Esperantisto*, la tiama provizora redaktoro plendis pri manko de engaĝiteco kaj supertaksado de la asociaj fortoj, kiuj bezonas redistribuon. Jen, do, kialo de malfrua apero de tiu ĉi numero, ankaŭ duobla, kaj krome negranda. Laŭlonge de la kuranta jaro aktivuloj de la asocio laboregas en la redistribuo de asociaj fortoj. Aktivularo kreskis, sed novaj engaĝitoj ne havas, ankoraŭ, la konon kaj la praktikon de siaj antaŭuloj. Krome, farendaĵoj kreskas rapide.

Problemoj aldoniĝas al troaj farendaĵoj, nova banko kaj novuleco de la kasista skipo malhelpis la enkasigon de la kotizoj, subvencio de la pasintjara agado ankoraŭ ne alvenis kaj la ĉi-jaraj subvencioj estas avaraj, fakto kiu ne ĉesigas nian agadon sed malra-

pidigas la plenumon de pluraj aferoj, ĉefe eldonaĵoj. Sed la plej grava problemo de la jaro estis la malhelpo de la magistrato de Santa Maria del Camí, en Majoroko, urbo kiu devis akcepti la 35an Katalunan Kongreson de Esperanto ĉi-jare sed kiu, lastmomente anoncis sian nedisponeblon. Finfine, do, estraro decidis okazigi la kongreson en 2011.

Pluraj aferoj estas farotaj, inter kiuj elstaras la nova retpaĝo de la asocio kiu baldaŭ estos preta, temas pri moderna kaj vigla retejo laŭ la nova grafiko de la Asocio kiu konstante aperigos novaĵojn, informojn kaj artikolojn.

Eĉ se sorto ĵetis bastonon en nian radon, Kataluna Esperanto-Asocio sukcese iras la vojon celitan kaj la agado de la unua ĉi-jara sesmonato estas sufiĉe kontentiga. KEA fariĝis plia membro de la Asembleo de Sociaj Movadoj de Katalunio. Krom la aktiva partopreno al socia forumo kaj la propono al aliaj sociaj movadoj agi por lingvaj rajtoj, nia Asocio starigis rilatojn kun pluraj enlandaj organizoj kiel vi legos en la numero kiun vi havas ĉemane. Tiu procezo ĉeesti la asocian kaj socian vivon de la lando kulminiĝos postsomere per planata nova oficejo de KEA en la sidejo de CIEMEN, samloke kiel aliaj asocioj por polaj, lingvaj kaj homaj rajtoj. □

En ĉi tiu numero kunlaboris: Bet Abeyà, Carles Verdugo, Christian Pinard, Dani Cortijo, Darío Rodríguez, Dolors Ortiz, Éric Collignon, Gerard Sugranyes, Hèctor Alòs, JM Milla, Joan Inglada, Josep Enric Peres i Blesa, Josep M. Serrano, Juanjo Vera, Karles Berga, Llibert Puig, Mon Cardona, Pedro Martín, Ramon Perera, Víctor Solé, Vildana Delalić, Xavier Margais.

**Associació Catalana d'Esperanto / Kataluna Esperanto-Asocio:**  
Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2009: individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; individua dumviva membro, 1280 eŭroj; kolektiva membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 001, Barcelona  
kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
Konto UEA: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera, Víctor Solé.  
Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Òscar Puig.

### Kataluna Esperantisto:

Redaktora skipo: Ferriol Macip i Bonet, Ramon Perera Perera, Ramon Rius, Víctor Solé; katalunlingva redaktoro: Hèctor Alòs i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

### Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: joves@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/joves  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 002, Barcelona  
kontonumero: 3025 0002 47 1433276794  
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Aida Sunyol, Anna Raventós, Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

# INTERNACIISME EN REUS

La pasintajn 21an, 22an kaj 23an de majo 2010 Reus gastigis la 7an Internaciisman Renkontiĝon, organizita de Kataluna Esperanto-Junularo kaj Maulets, revolucia ma junularo sendependentisma. Subtenis la organizadon la magistrato de Reus kaj la historia Centre de Lectura.

La kunagado kun loka anaro tute ne esperantisma igis la renkontiĝon riĉa je movada interŝanĝo. Partoprenantoj ricevis folion kun plej oftaj kaj utilaj frazoj el Esperanto al la kataluna, kaj el la kataluna al Esperanto; tial lokanoj kaj eksterlandanoj ekis konversaciojn kaj la emo interkompreniĝi fariĝis evidenta, eĉ spontanee aperadis novaj frazoj en la folioj, ĉefe flirtocele. La socia rezulto: Maulets ekinteresiĝas pri Esperanto, nekatalunaj esperantistoj konas pli profunde katalunan socion.

Du salonoj akceptis la diversajn prelegojn, kaj en centra placo Peixateries Velles okazis la kunvivado, la manĝoj, la koncertoj kaj la dancoj. En la sama placo staris libroservo de Kataluna Esperanto-Asocio, la diskoservo de Vinilkosmo, la trinkejo de Maulets kaj la akceptejo.

Alexandre Raymond, Jean-Marc Leclerc kaj Ander Martínez gvidis rondan tablon pri la situacioj de siaj lingvoj, t.e. la arpitana, la okcitana kaj la eŭska; la ronda tablo estis prezentita unue en Esperanto, kaj sekve en la kataluna. La programo ankaŭ proponis al esperantistoj atelieron pri tradiciaj homaj turoj kaj enkondukon al la kataluna lingvo. Al lokanoj la programo proponis atelieron pri lingva daŭripovo kaj enkondukan kurson de Esperanto. Al ĵusbakitaj esperantistoj la renkontiĝo proponis enkondukon al la Esperanto-movado, sesion kun dubosolvanto kaj praktikan kurson de Esperanto celanta konversacii en la renkontiĝo.

La programo celis plenumi ĉies interesojn, katalunlingva programo enkondukis esperantajn valorojn kaj kulturon al lokanoj kaj esperantlingva programo enkondukis la partoprenantojn al la kataluna kulturo. Sed la plej gravaj programeroj estis tiuj komunaj, cele al kunagado. Estis tri koncertoj: vendrede nokte koncertis lokaj DJoj okazigintaj festegan junan etoson en la placo; sabate koncertis neelĉerpebla JoMo kiu kapablis danci kaj kantigi la tutan ĉeestantaron per sia plurlingva



JOSEF ENRIK PERES / BLESIA

spektaklo festa kaj danciga; dimanĉe koncertis loka grupo Nomadah la Ghana kiu surprizigis la publikon per kanto en Esperanto. La komuna programo dulingva ankaŭ proponis atelieron pri tutmondaj popoldancoj gvidatan de Mon Cardona kaj historikultura vizito al la urbo Reus.

Estis bela vetero. Estis agrablaj retroviĝoj. Sed plej grave, estis forta socia profito. Kelkaj neesperantaj sindikataj, politikaj kaj sociaj organizoj ekdebatas pri la enkonduko de la internacia lingvo en siajn regularojn kiel rekomendo al internacia, daŭripova kaj neimperiisma komunikado en internaciaj rilatoj. Deko da partoprenantoj en la renkontiĝo jam anoncis sian ĉeeston en venontaj kursoj de Esperanto. □

**La kunagado kun loka anaro tute ne esperantisma igis la renkontiĝon riĉa je movada interŝanĝo**

**Maulets** estas juna politika organizo en kiu anas junuloj sub 25 jaroj. Ĝia celo estas la sendependiĝo, la revolucio kaj la unuiĝo de la Kataluna Landaro laŭ la principioj de ekologio, feminismo kaj senklasismo rifuzante ĉiajn premojn ekonomiajn, militajn, patriarkajn kaj naturpoluajn. La vorto "Maulets" venas el satira nomo de partianoj en Valencio de Karolo la 3a de Aragono, Katalunio, Valencio kaj Majorko (la 6a de la Sankta Romia Imperio) dum la Milito de hispana sukcedo, en kiu la tuta Kataluna Landaro perdis siajn rajtojn. La junulara organizo Maulets fondiĝis la jaron 1988.

# VERKO VOJOMONTRA



**A**peris komence de februaro la libro *Història de l'Esperanto als Països Catalans. Recull d'articles - Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro. Artikolkolekto*. Temas pri impona 472-paĝa kolektiva verko grupiganta 21 artikolojn de 14 aŭtoroj sub la redaktado de Francesc Poblet i Feijoo kaj Hèctor Alòs i Font. Dek unu el la artikoloj estis aperintaj en disaj gazetoj (ses el ili en *Kataluna Esperantisto*), kvankam pluraj ricevis pli-malpli grandajn novajn redaktojn (ekz. du el ili fandas po du publikigintajn artikolojn). Aliflanke dek artikoloj aperas premiere en la libro – kaj ofte ili estas la plej longaj, eble ĉar ili estis pensitaj ĝuste por libro.

Kiel en antaŭaj verkoj pri historio eldonitaj de KEA ĝi aperis dulingve en la kataluna kaj en Esperanto, kio estis sukcesinta danke al la kunlaborado de 17 tradukantoj. Tio ebligas la legadon de la libro same al esperantistoj interesigantaj pri historio, kiel al katalunlingvanoj scivolemaj pri Esperanto. Tio permesos, ke ĝi estos dissendata kaj al la ĉefaj Esperantobibliotekoj kaj al diversaj universitataj bibliotekoj en la Kataluna Landaro. Fakte la libro estas originale dulingva: 16 el la artikoloj estas

origine verkitaj en la kataluna kaj 5 en Esperanto; en pluraj okazoj la aŭtoroj mem tradukis siajn tekstojn. Ĉiuokaze, kvankam la tradukoj estas iom adaptitaj por malsama publiko, la esperantlingvaj legantoj ie-tie renkontas iujn klarigojn iom superflujajn por ili, kvankam tiuj ja permesas kompreni, kiel la aferoj estas prezentitaj al nacilingva legantaro.


La verko prezentas artikolojn pritraktantaj diversajn aspektojn de la historio de Esperanto en la katalunlingvaj landoj ĝis proksimume la jaro 1940. La redaktoroj avertas enkonduke pri la diverseco de la esperantistaro kaj eĉ subtrekas la foje mirinde akrajn internajn batalojn. Tio finfine ne estis ekskluziva trajto de la esperantistoj, sed ĝi respegulis la tiamajn brulajn sociajn batalojn inter laboristoj kaj burĝoj kaj inter katalunaj kaj hispanaj naciistoj.

Plie, la grandaj kaj tre rapidaj ŝanĝoj en la socio dum la pristudata periodo kaj poste iom malfaciligas la bonan komprenon de la priskribitaj okazaĵoj, ĉefe, sed ne nur, ĉe alilandanoj. Tiucele la verko havas tri helpajn apendicojn, aldone al kvara, bibliografia. Verŝajne la plej grava estas 11-paĝa paralela kronologio de

L'ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO  
NOMÉS ES MANTÉ AMB LES VOSTRES APORTACIONS

## Fes-te'n soci

Com a soci de l'Associació rebràs la revista, estaràs al corrent de tots els esdeveniments, tindràs rebaixa als congressos...  
i sobretot estaràs contribuint amb el moviment esperantista a casa nostra.



Sendependa inform-centro  
ankaŭ en esperanto

<http://barcelona.indymedia.org/>



okazaĵoj en la katalunaj socio kaj esperantistaro. Aldone demografiaj tabeloj montras la rapidegan kreskon de la urba loĝantaro inter la jaroj 1900 kaj 1930: ekzemple Barcelono saltis en tiuj 30 jaroj de iom pli ol 500 000 loĝantoj al 1 miliono. Laste 21-paĝa glosaro donas mallongajn informojn pri multnombraj organizaĵoj cititaj en la artikoloj.

La artikolaro mem estas dividita en tri partoj: “Temaj studoj”, “Lokaj studoj” kaj “Bibliografio”.

La unua ĉefe prezentas konkretajn epizodojn de la Esperanto-movado. Plej multe kontribuas al tiu ĉi parto la historiisto Francesc Poblet per kvin el la ok artikoloj. “Serĉante universalan lingvon: La esperantista movado en Katalunio” estas precipe enkondukanta prezento de la katalunia Esperanto-movado. “Esperanto kaj anarkiismo en Katalunio” skize prezentas la agadon por Esperanto de la potencega anarkiismo en nia lando. “Kataluna Esperantisto (1910–1936)” prezentas la vivon de la antaŭmilita organo de Kataluna Esperantista Federacio, kiu estas tiel malfacila kaj interrompita kiel tiu de sia eldonanto. “La kongreso de Vinaròs: La subpremado de la kataluna Esperanto-movado dum la diktaturo de Primo de Rivera” ĝuste priskribas unu el tiuj epizodoj, en kiu Kataluna Esperantista Federacio ĉesis sian aktivadon, ĉi-okaze pro politika persekuto de aŭtoritatoj pelata de alitendaraj esperantistoj. Fine, en artikolo komuna kun Hèctor Alòs, Poblet priskribas eble la ĉefan atingon de la kataluna Esperanto-movado: “La Kataluna Antologio”. Sambloke, Abel Montagut prezentas la forton de la komenca jardeko de Esperanto-movado en Katalunio en “La interlingvo Esperanto: Noviga faktoro en Katalunio dum la jarcenta ŝanĝo (de 1898 ĝis 1909)”. Siavice Xavier Margais priskribas reagojn de hispanaj aŭtoritatoj okaze de la valencia kongreso de SAT en 1934 en “Esperanto, esperantismo kaj ilia rilato kun kelkaj reĝimoj”. Blokofine, Toño del Barrio kaj Ulrich Lins artikolas pri “La utiligado de Esperanto dum la hispana intercivitana milito”.

La dua parto de la libro estas la plej longa, kvankam ĝi entenas ok artikolojn, kiel la unua. Malkiel ĉi-lastata, la plimulto de la kontribuoj aperas premiere. Hèctor Alòs kaj Llibert Puig prezentas “La komencon en Ceret de la kataluna Esperanto-movado”, dum Jean Amouroux iel kompletigas la rakonton per sia “Skizo pri la Esperanto-movado en Rusiljono (1902–1947)”. Sekvas artikolo de Xavier Margais titolita “Novaĵoj pri la esperantismo en Maó (1905–1910)” kaj detalaj priskriboj de la historio de tri Esperanto-grupoj: “Historio de la Esperanto-movado en El Vendrell”, de Pedro Martín; “Kroniko pri la Esperanto-

movado en Vilanova i la Geltrú”, de Joan Inglada; kaj “Esperanto en la Popola Enciklopedia Ateneo de Barcelono” de Ferran Aisa. Toño del Barrio denove kontribuas per “Kelkaj notoj pri la laborista Esperanto-movado en Valencio ĝis la intercivitana milito”, dum Xavier Margais finas la duan parton per “La Esperanto-movado en Majoroko: Plia viktimo de la frankisma subpremado”.

La tria kaj lasta parto estas la plej mallonga kaj inkluzivas kvin biografiojn de elstaraj katalunaj esperantistoj, kiuj komprenigas kiaj homoj fariĝis esperantistoj kaj samtempe influis la katalunan esperantistaron. Francesc Poblet prezentas verŝajne la plej decidan el ĉiuj –“Frederic Pujulà i Vallès, verkisto, katalunisto kaj esperantisto”–, dum Dani Cortijo eble la plej faman en Katalunio per sia “Joan Amades kaj Esperanto”. Siavice Jordi Solé i Camardons prezentas la idearon de eble la plej influa en la kataluna movado –“Delfí Dalmau: Katalunismo, liberanismo kaj esperantismo”–, dum Jean Amouroux eble la plej internacie aktivan figuron: Pastro Joan Font i Giralt (1899–1936). Laste Elisabet Abeyà proksimigas al ni la vivon kaj verkaron de eble la plej erudicia: “Joan Mascaró: Inter Oriento kaj Okcidento”.

La artikolaro parte kunigas esploralaborojn faritajn en la lastaj dekelkaj jaroj kaj parte instigis novajn esplorojn. Tio donas al ni bonan perspektivon pri la antaŭmilita Esperanto-movado, sed indas ankoraŭ multe esplori. Mankas priskriboj pri multaj Esperanto-grupoj, i.a. pri kelkaj tiel gravaj kiel “Paco kaj Amo” en Barcelono aŭ la grupoj en Sabadell kaj Terrassa. Ege interesa estus pli detala priskribo pri la anarkiisma Esperanto-movado, kiu pli bone prezentus la efektivan uzadon de Esperanto en tiu medio. Ankaŭ esploroj pri unuopaj esperantistoj, malpli eminentaj, helpus pli bone kompreni la rolon de Esperanto en la vivoj de unuopaj laboristoj. Kaj preskaŭ ĉio farendas ankoraŭ por kunmeti historion de la postmilita Esperanto-movado. Ĉiaj ĉi esploroj helpos nin kompreni la sociajn aspektojn de Esperanto, konatiĝi kun la tradicio, de kiu ni devenas, kaj kun parto de la nekonata socia historio de Katalunio. Certe troviĝos multe da rakontindaj kaj legindaj historioj, kiel tiuj, kiuj kuniĝis en tiu libro. Esplormaterialo por verki plurajn volumojn similajn al ĉi tiu sendube restas.

Laste indas gratuli nin, kiel iom post iom enkondukiĝas unueca stilo en la eldonaĵoj de Kataluna Esperanto-Asocio, kio altigas ilian kvaliton kaj samtempe igas ilin rapide rekonblaj. Tiel la nuna artikolaro sekvas la stilon de *Kataluna Esperantisto*, de la eldonaĵoj de la Kolekto Delfí Dalmau kaj baldaŭ de la novaj retejoj, flugfolioj, aliĝiloj ktp. □

***La verko prezentas artikolojn pritraktantajn diversajn aspektojn de la historio de Esperanto en la katalunlingvaj landoj ĝis proksimume la jaro 1940***

***La artikolaro mem estas dividita en tri partoj: “Temaj studoj”, “Lokaj studoj” kaj “Bibliografioj”***

***La nuna artikolaro sekvas la stilon de Kataluna Esperantisto, de la eldonaĵoj de la Kolekto Delfí Dalmau kaj baldaŭ de la novaj retejoj, flugfolioj, aliĝiloj ktp.***

## JARFINE EN CONFLENT

Christian Pinard

La lastan dimanĉon de Junio 2010, la anoj de la Grupo Esperanto Conflent kuniĝis por festi la finon la kursjaro 2009-2010, ne plu cirkaŭ lernolibroj kaj nigra tabulo, sed cirkaŭ bona tagmanĝo.

Laŭ tradicio nun firme starigita ĉe tiu aro da amikoj, la kursoj ĉiam ekas kaj finiĝas per komuna manĝado. Ĉi jare ni retrovis kun ĝojo kaj plezuro la gastejon de S-ino Mary kaj ties filino Sophie, kie okazis antaŭ jam tri jaroj neforgesebla renkontiĝo de samideanoj el du flankoj de Pireneoj sub la standardo de KEA. La tradician katalunan kuirarton de niaj gastigantinoj ni ne plu bezonas prezenti, ni retrovis plezurege ilian gastronomian arton!

Monique kaj François, niaj du novaj lernantoj de la jaro, malkovris ĉi okaze tiun magian ejon, kvankam ili jam ĝuis dum la jaro la etoson ĉiam amikan kaj "manĝeman" de la grupo.

La lernantaro donacis ĉe la komenco de la tagmanĝo du belegajn librojn al la instruanto Christian kaj ties amikino Amparo, unu pri fotoj el monto Canigó, el Paul Palau, alia pri kataluna kuirarto, tiu el la fama Eliane Thibaut Comelade. Evidente, temas pri invito al novaj gastronomiaj renkontiĝoj!

Tuj je la eko de la nova kursjaro 2010-2011, ni retrovos nin cirkaŭ tablo por komenci feste la jaron. Ĝis tiam, bonajn feriadojn al ĉiuj! □



**Cent anys d'Esperanto  
als Països Catalans**

## ASEMBLEO

La jara asembleo de KEA okazis la 14an de marto kun la partopreno de 14 membroj en la asocia sidejo, en Sabadell. Tri aspektoj elstaras en la ĉi-jara asembleo: kreado de nova profesia retejo por KEA, rolo de KEA en la organismoj prizorgantaj la Muzeon de Esperanto de Subirats kaj pristudo de kotizoj por nepagipovaj asocioj.

La asembleo debatis la difinon de la kotizoj prizorgante la monkondiĉojn de senlaboruloj, emeritoj kaj familiaj grupoj. Oni pritraktis proponon de Ramon Perera krei apartan asocion aŭ asocieron por amikoj kaj simpatiantoj de nia movado. Estrara komisiono devas prilabori tiujn proponojn.

La asembleo proponas okazigi solenaĵon en Sabadell kaj krei logotipon de la centjariĝo kiun la asocio celebras ĉi-jare.

En la ĉapitro pri ŝanĝo de estrar-postenoj, Llibert Puig akceptis daŭrigi kiel prezidanto. Aliflanke, Ferriol Macip petis liberigon de la sekretaria posteno –elekto plene subtenita de la asembleo– kaj plurlas kiel asocia dungito. Siavice, Ramon Perera transprenas la sekretarian postenon. Gemma Armadas helpas Àngels del Pozo-n en la kasista posteno. □

## EN LINGUAMÓN

La pasintan januaron, la Centro de vizitantoj Linguamón ricevis nin kiel grupon, post peti klarigan viziton. Situantu en la malnova fabriko Can Ricart, temas pri ekspozicia spaco kiu celas klarigi la enhavon de la nova Domo de la lingvoj, pere de murtabuloj, kvar aŭdovidiloj, maketo kaj interaktivaj ekranoj. La celo de la ekspozicio estas klarigi pri kio temas la konstruaĵo dediĉita al lingvoj inaŭgurota la jaron 2013.

Temas pri rekomendita evento, la spaco estas malfermita sabate el la 10a ĝis la 14a. Unuavide vi rimarkos ke ĉiuj klarigoj estas en la kataluna, en la hispana kaj en la angla. Estas ja surpriziga afero, ke projekto sin difinanta respektema pri ĉiuj lingvoj roligas la anglan kiel pontolingvon. Se vi estas observemaj, vi rimarkos ke la plej parolata lingvo en la aŭdovidiloj estas la angla. La gvidisto rimarkigis al ni, ke la lokigo de la estonta Domo de la lingvoj en la distrikto 22@ estis antaŭvidita, kiel disktriko de la negocoj kaj kultura kaj teknologia areo, tialdo, certe la angla jam ekas privilegie. Se Linguamón celas igi vere la domo de ĉiuj lingvoj estos necese peni por ke ĉiuj lingvoj estu same reprezentataj: temas pri okazo kiun ni tute ne povas malestimigi. Esperanto ankaŭ ne. □

## EN SOCIA FORUMO

La lastan semajnfino de januaro okazis en Barcelono la dua Kataluna Socia Forumo. Temas pri renkontiĝloko malfermita, diversa, plurala, nereligia, neregistara kaj nepartiema en la Kataluna Landaro, samtempe organizata tutmonde. Tie, oni interŝanĝas ideojn, debatas, agas kaj sociaj movadoj renkontiĝas cele al esploro de alternativoj.

Kataluna Esperanto-Asocio aktive partoprenis la eventon kaj dum du tagoj starigis ekspozicion pri lingva daŭripovo kaj informbudon. Krome nia asocio organizis prelegon pri lingva daŭripovo fare de la lingvisto Carme Junyent kiu memorigis ke nur 5% de la mondolingvoj bone fartas, kaj klarigis, ke indas labori por konservi la lingvan diversecon de la planedo. La lingvisto taksis esperantismon kiel socian movadon kiu povas helpi al tiu agado por lingva ekologio. □



VICTOR SOLÉ

*Roger Sanjaume enkondukas la prelegon de la lingvisto Carme Junyent organizitan de KEA en la Kataluna Socia Forumo*

## ESPERANTO-KURSO EN PUBLIKA LERNEJO

En la publika lernejo de Bunyola (Majoroko), okazis kurso de Esperanto dediĉita al infanoj de la 5a kaj 6a niveloj. Ili aĝas 11 kaj 12 jaroj.

Ĉi tiu kurso ekis en oktobro 2009, kaj finiĝis fine de majo 2010. La instruistino Elisabet Abeyà, kiu jam havas longan sperton en tiu laboro (ŝi instruis kelkajn jarojn antaŭe en la lernejo de Valldemossa), gvidas la kurson, kie elstaras amuza etoso, kaj ili uzas lernolibron *Ludu kun ni*, verkita de Elisabetta Formaggio.

La grupo ludis, kantis, festis, lernis poemojn en Esperanto kaj korespondis kun simila grupo en Gubin, Pollando. Nun ne estas strange en Bunyola aŭskulti Esperanton en la strato kiam la infanoj ludas libere. Krome, la gepatroj, ne nur tiuj de la infanoj de la esperanta kurso, sed ĉiuj, jam scias, ke Esperanto estas pli ol bela lingvo, ĉar ili konstatas ke ĝi utilas por interkomunikado.

Verŝajne la sperto daŭros dum la venonta kurso. □

## INTENSIVA KURSO EN SABADELL

Dum la semajnfino de la pasintaj 12a, 13a kaj 14a de marto, CES organizis, en sia sidejo de Creu Alta, intensivan elementan kurson de 15 horoj pri Esperanto. Kvin lernantoj, plimulte junuloj, partoprenis ĝin. La alta nivelo de tiuj partoprenantoj, ilia bona grupharmo-



ELISABET ABEYÀ

*La grupo ludis, kantis, festis, lernis poemojn en Esperanto kaj korespondis kun simila grupo en Gubin, Pollando*

nio kaj koheriĝo, permesis progresi laŭ bona ritmo kaj eĉ antaŭstudi malfacilaĵojn kiuj ne estis programe antaŭviditaj. Estis entute 15 intensaj kaj distraj horoj kiuj alportis la unuan esperantan koneton kiun ĉiu povos uzi laŭ siaj emoj kaj eblecoj. Tri el la lernantoj fakte intencas baldaŭ translokiĝi al aliaj kontinentoj (Kanado kaj Argentino). Ni deziras al ili “bonan vojaĝon, bonan integriĝon kaj bonan ŝancon” kaj al ĉiuj kvin “bonvenon en Esperantujo”. □

## ĈE GRANDA ORIENTO

Ramon Perera kaj Roger Sanjaume prelegis pri Esperanto la pasintan 26an de aprilo ĉe Granda Oriento, framasona loĝio de Katalunio aparte elstara pro sia agado kun la asocia vivo de nia lando.

Sanjaume parolis pri lingva demokratio kaj reliefigis la utilon de Esperanto al valoroj pri lingvaj rajtoj kaj Perera pritraktis la universalisman fratecon de nia afero. Post la prelego, la publiko starigis kelkajn demandojn kiuj montris la klarecon de la ĉeestantaro.

Kvankam la prelego estis malfermita al ĝenerala publiko, ĝi okazis kadre de framasona ritualo. □

## SANT JORDI

Dum la Librotago, la 23an de aprilo, KEA organizis tuttagan budon en Barcelono kaj, kunlabore kun la loka Esperanto-centro, ankaŭ en Sabadell. Danke al la akirita sperto dum la pasintaj jaroj, tre senteble pliboniĝis la vendado kaj la kvanto da senpage distribuita materialo, kiuj vaste superis la prognozojn. □

## KUNAGADO EN VALENCIO

De la 4a ĝis la 6a de junio okazis en la eksfluejo de la rivero Túria en Valencio la Alternativa Foiro, kie partoprenis esperantistoj el pluraj organizoj: Kataluna Esperanto-Asocio, Valenciana Esperanto-Grupo, Eŭropo Demokratio Esperanto kaj Sennacieca Asocio Tutmonda. De tiu renkontiĝo naskiĝis intencoj de estontaj kunagadoj.

La kunagado kun sociaj movadoj ekmontras siajn fruktojn. Radio Malva, libera radio elsendanta el kvartalo La Malva Rosa, proponis enkonduki radielsendaĵojn pri Esperanto ĉiusemajne aŭ ĉiumonate laŭ niaj fortoj kaj kapabloj; la sindikato Coordinadora Obrera Sindical, de la sendependentisma maldreks-trularo, planas informi pri Esperanto, demetante mitojn, aldonante al ilia TTT ligilon al esperanto.cat, ktp. Krome, kelkaj homoj de diversaj sociaj aranĝoj, kiel Decreixement (kontraŭkapitalistoj), Entre Iguales (kolombianoj), ktp., montris fortan intereson al nia lingva movado. □

## EN RADIO EL VENDRELL

La pasintan 9a de junio, nia samasociano Dolors Ortiz kontribuis en la programo Pas de Vianants en la urba radio de El Vendrell. Temas pri babilronda programo pri aktualaĵoj elsendata ĉiun merkredon inter la 7a kaj la 8a vespere. Dolors Ortiz parolis pri la Esperantomovado, pri ĝia historio, muziko kaj kulturo kaj klarigis kiel lerni ĝin. Ortiz ankaŭ sugestis rekuperi la straton Zamenhof, kiu perdis tiun nomon dum frankismo. □



Dum la Librotago KEA starigis budon en La Rambla de Barcelono



Kadre de la Alternativa Foiro, esperantistoj el diversaj organizoj de la Kataluna Landaro starigis budon en Valencio



# MUZEO DE ESPERANTO DE SUBIRATS

Llibert Puig

**T**roviĝas en Sant Pau d'Ordal (komunumo Subirats) privata Muzeo de Esperanto, kreita de la loka apotekisto Lluís M.Hernández Yzal. La muzeo inaŭguriĝis la 5an de majo 1968 okaze de la 10a Barcelon-Provinca Esperantista Renkontiĝo kaj ĝi estas tutmonde rekonita kiel tre grava Esperanto-kolekto.

Post la forpaso de la iniciatinto la jaron 2002, la Muzeo stagnis. En la jaro 2009 ekis kontaktoj inter la heredinto kaj la Patronaro de Turismo de la magistrato Subirats. La magistrato strebas al helpo de la provinca registaro por konstrui publikan bibliotekon kaj la muzeo povus fariĝi aneksaĵo se ĝi estus sufiĉe prestiĝa en la eksteresperanta medio.

Rafael, la sola filo de la iniciatinto, kiu oficis kiel reprezentanto de la familio, trovis la ideon akceptebla, se la kolekto nepre havas konvenan prizorgon por garantiĝi ĝian normalan daŭrigon.

La loka turisma patronaro, gvidata de Daniel Garcia Peris kunvokis kunvenon por pritrakti la aferon kaj invitis Katalunan Esperanto-Asocion kiel fakulojn, por ekpaŝi cele al la diskonigado de la Muzeo kaj ĝia remalfermo. Post vasta kaj trafa inform-kampanjo ili sukcesis venigi la katalunan televidon TV3 kiu surloke dum kelkaj horoj sukcesis pretigi tre interesan kaj kelkminutan raporton, dissendita dum la tagmezaj kaj vesperaj novaĵelsendadoj. Pluraj ĵurnaloj aperigis informojn kaj intervjuojn kaj kelkaj lokaj televid-stacioj elsendis raportojn.

Responde al propono de la Patronaro, KEA akceptis prove respondi dum du monatoj pri gvid-servo de la muzeo dum la semajnfinoj. La elektita homo kun pruvita kapablo kaj meritoj estis nia membro Karles Berga. Li skrupule deĵoris dum la semajnfinoj kun sukceso. Dankindas ankaŭ la retpaĝo kiun li pretigis, vizitebla laŭ jena adreso: [www.museuesperanto.org](http://www.museuesperanto.org) kun ligiloj al KEA kaj al la du aliaj katalunaj bibliotekoj: en Moià je memoro de Ramon Molera i Pedrals kaj en Sabadell je memoro de Petro Nuez i Pérez.




GERARD SUGRANYES

Ekzistas multegaj diverstemaj bibliotekoj-muzeoj en la mondo kiuj helpas la homojn kompreni pli bone la pasintecon. Ankaŭ pri Esperanto ekzistas muzeoj en diversaj landoj, ĉar post 123-jara ekzisto de la internacia lingvo multe da materialo akumuliĝis kaj ili atendas la vizitojn de historiistoj kaj studentoj.

La 13an de junio, la Asocio organizis kolektivon diskonigan vojaĝon al la Muzeo kaj per altira programo memoris kaj omaĝis ties iniciatinton.

Post dumonata provperiodo (je kosto de KEA) Karles Berga daŭre prizorgas dum semajnfinoj la vizitadon kaj vigligon de la Muzeo dunge de la Patronaro de Turismo de Subirats. La muzeon vizitigas ankaŭ loka entrepreno Can Rossell Natura, kiu okupiĝas pri natura edukado kaj kultura vigligo por grupoj kaj lernejoj. □

**La magistrato strebas al helpo de la provinca registaro por konstrui publikan bibliotekon en kiu la muzeo povus fariĝi aneksaĵo**



## HISTORIOJ DE BARCELONO

Nia samasocio Dani Cortijo, premiita oktobre pro sia blogo *altesbarcelones.blogspot.com* pri epizodoj de la historio de Barcelono kiel plej bona kataluna kultura blogo de 2009, publikigis la libron *Histories de la historia de Barcelona*. Temas pri libroforma eldono de sepdeko da atentokaptaj rakontoj plukitaj el la historio de Barcelono, kiuj nur parte aperis en la retkajero.

Cortijo, Dani. *Histories de la historia de Barcelona*. Robin Book, Barcelona, 240 paĝoj, 17,90 €. □

## REĜO DE IMPROVIZITAJ KANTOJ

Ferriol Macip ricevis la titolon de “Reĝo de *nyacres*” en la jara konkurso de tiu tipo de improvizita kanto, okazinta la 10an de januaro. *Nyacra* estas unu el la tipoj de improvizitaj kantoj, kiuj estas popularaj en diversaj lokoj de la katalunlingvaj landoj, kaj kiuj diferencigas inter si per la metroj kaj melodioj. *Nyacra* konsistas el oksilabaj kvarversoj, en kiuj la tria ripetiĝas kaj rimas la dua kaj la kvara. La konkurso de *nyacres* en la vilaĝo Espolla okazas jam la okan fojon. Ĝi estas organizata de la konata muzikisto kaj aktivulo por la revigligo de la popola muziko Jaume

Arnella. Nia samasocio venkis en la finalo la pasintjaran reĝon, la popularan muzikiston Francesc Ribera, *Titot*, ano de la ensembloj Brams, Aramateix kaj Mesclat. □

## NOVA FAMILIA VORTARO

Karles Berga lanĉis novan eldonon de sia *Vocabulari familiar català-Esperanto*. La unua eldono de tiu verko aperis en 2001. La dua, kun dato de marto 2010, estas reviziita kaj ampleksigita, kiel la aŭtoro klarigas enkonduke. Entute temas pri 1109 kapvortoj kun 1447 signifoj. La nova eldono enhavas ankaŭ tre resumitan prezenton de la gramatiko de Esperanto. □

## PRI KATALUNIO EN ETNISMO

La aparte riĉa decembra numero de la revuo *Etnismo* dediĉas tutajn sep paĝojn al katalunaj aferoj. En preskaŭ kvin-paĝa artikolo titolita “Senelirejo en Hispanio” nia samasocio Hèctor Alòs prezentas la aferon de la apelacio kontraŭ la Statuto de Aŭtonomio de Katalunio antaŭ la hispania konstitucia tribunalo. Li profitas la okazon por detale prezenti la politikan evoluon en Hispanio en la lastaj dekkelk-jaroj kaj atentigi pri la laŭ li okazanta ekstremito de la hispana naciismo. Sekvas artikolo de Sergi Rodríguez i Sender titolita “La fiasko de la «lingvomerga» instrupolitiko en Katalunio” kaj repliko de Hèctor Alòs. Laŭ la unua aŭtoro la katalunaj instrupolitiko ne atingis sian celon, kiu estas la disvastigo de la kataluna kiel hejma lingvo de katalunianoj, kaj proponas socian agadon por la kataluna anstataŭ ĉefe publikan. Kontraŭas la dua aŭtoro asertante, ke la lingva asimilado neniam estis celo de la katalunlingvaj lingvopolitikoj kaj taksas ilin relative sukcesaj, kvankam li agnoskas gravajn problemojn en la socia uzado de la kataluna inter la junularo. □

## OMAĜO AL KUNA LABORO

Okaze de la 70-jariĝo de Humphrey Tonkin Universala Esperanto-Asocio omaĝis sian eksprezidanton kaj elstaran aktivulon dum kvindeko da jaroj per impona libro titolita *La arto labori kune*. Temas pri grandega kolekto de artikoloj verkita por la okazo de pli ol cent aŭtoroj, sub la redakto de Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. La verko plenigas 901 grandformatajn paĝojn. Nia samasocio Hèctor Alòs kontribuas al ĝi per 16-paĝa artikolo titolita “La katalunaj esperantistoj. Socilingvistika trarigardo”, en kiu li prezentas la esencajn rezultojn de sia enket-esploro de novembro 2007. □



SENGI PALAU

## STIPENDIO POR ESPLORO PRI ESPERANTISTINO

La pasintan 16an de februaro, en la urbo-domo de El Vendrell, antaŭ dudekhoma publiko, Gisela Alcón (El Vendrell 1964; nun loĝanta en Reus) oficiale ricevis la sepan stipendion Jaume Ramon i Vidales, konsistantan en 3000 eŭroj, per sia propono fari esplorklaboron pri la loka esperantistino Maria Julivert i Aulés.

Maria Julivert estis grava membro de la tiea grupo Frateco ekde sia aliĝo en la jaro 1912. Ŝi estis la unua instruistino de Esperanto en la urbo, plurfoje okupis respondecajn postenojn kaj kunorganizis la 16an Katalunan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en El Vendrell en la jaro 1933. Ŝia nomo aperas eĉ en la *Enciklopedio de Esperanto*.

Krom tio ŝi ankaŭ aktive partoprenis en la loka kultura vivo ĝenerale kaj estas ekzemplo de la graveco kaj influo, kiujn komencis havi virinoj en nia socio dum la unua triono de la lasta jarcento.

Ĵurion de la stipendio prezidis s-ro Benet Jané, urbestro, kaj konsistigis s-ro Ramon Arnabat, prezidanto de la Institut d'Estudis Penedesencs, s-ino Montserrat Comas, direktorino de la Biblioteko-Muzeo Víctor Balaguer, de Vilanova, s-ino Montserrat Duch, vicrektorino de la Universitato Rovira i Virgili kaj nia samasociano Pedro M. Martín, kiu mem verkis esplorklaboron pri la historio de la Esperanto-movado en El Vendrell.

Post bonveniga saluto de la urbestro kaj oficiala legado de la verdikto, Pedro M. Martín parolis nome de la ĵurio kaj esprimis la deziron, ke la verkota laboro diskonigos, ne nur loke, la gravan rolon de Maria Julivert kaj de la esperantista movado en la kultura historio de la urbo.

Fine parolis Gisela Alcón, kiu dankis la konfidon de la ĵurio kaj faris mallongan skizon pri la vivo de Maria Julivert.

Nun s-ino Alcón havas du-jaran periodon por realigi sian esploron kaj verki libron minimume 100-paĝan, kiun espereble poste la urbestro publikigos.

Novaĵojn pri la okazaĵo elsendis la lokaj radio- kaj televid-stacioj kaj publikigis du-tri komarkaj periodaĵoj. □

## EN SLOVENIO KAJ KROATIO

Fine de la pasinta jaro kaj dum translokiĝo al slovenia urbo Maribor, nia samasociano Carles Verdugo interkonatiĝis kun Zlatko Tišlar, aŭtoro de la Zagreba Metodo. Sekvis kelksemajna kunlaborado al kurso de Esperanto enkadrigita en projekto kiu eksperimente enkondukas lernadon de Esperanto en infanĝardenoj. En la kurso lernis estontaj instruistoj, kiuj laŭ la programo de la projekto siavice instruos mariborajn infanojn.

Dum 2010 Verdugo loĝis en Zagrebo kie li rapide integriĝis kaj gvidis Esperanto-kurson por junuloj laŭ propono de Kroata Esperanto-Ligo. En Zagrebo, Carles okupiĝas pri intensiva studado de la kroata normlingvo. Kadre de la kurso li prelegis pri "Lingva egalrajteco en Eŭropa Unio", prelego strukturita laŭ la eseo de Zlatko Tišlar *Eŭropo, vi baldaŭ mortos*. □

## BOSNIAJ ESPERANTISTOJ POR JUBILEO EN PROPRA DOMO

Vildana Delalić



**M**anko de propra kunvenejo, la plej grava problemo kiun frontas esperantistoj de Sarajevo kaj ĝenerale de Bosnio-Hercegovino dum la lastaj 18 jaroj, estas definitive solvita. Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino kun partopreno de deko da siaj membroj kunaĉetis loĝejon en centra zono de Sarajevo (str. Kralja Tvrtka 19) kiu servos kiel kunvenejo de lokaj esperantistoj, sed samtempe kiel sidejo kaj oficejo de la Ligo.

La aĉetita ejo estas en detruita stato kaj ĝi bezonegas fundan renovigon, kiel videblas sur la apudaj fotoĵoj. La rekonstruajn laborojn oni pritaksas je 15.000 eŭroj. Tiucele la Ligo lanĉis apartan fondaĵon "NIA DOMO" por kolekti financajn rimedojn por renovigaj laboroj kaj posta instalo de oficeja ilaro. Ĝi invitas siajn membrojn, esperantistojn kaj amikojn tra la mondo per modestaj, eĉ simbolaj kontribuoj subteni "NIAN DOMON". La kontribuoj estas interalie pageblaj al la banko-kontoj de UEA, kodnumero elbh-j.

Antaŭ la kontraŭbosnia agreso en 1992, bosniaj esperantistoj disponis en Sarajevo pri tri kunvenejoj, ĉiuj en centra kvartalo de la urbo – oficejo de la Ligo, kunvenejo de la loka E-societo kaj klubejo de Universitata E-klubo. Post la milito nova aŭtoritato rezignis redoni eĉ unu el la ejoj al la Esperanto-organizaĵoj. Tial la aĉetita kunvenejo estas historia evento por la bosnia E-movado, kiu ĝuste ĉi-jare en 2010 festas sian centjariĝon. □

# PONTO INTER HINDEŬROPAJ BELETROJ

Carles Verdugo

**P**rojekto finance subtenata de la Eŭropa Komisiono sub la nomo “Tri eŭropaj porinfanaj fabeloj en Barato kaj unu barata porinfana fabelo en Eŭropo” proksimigos la bengalan kulturon al tri eŭropaj landoj kaj sendos iomete da eŭropa literaturo al bengalaj infanoj.

Laŭ iniciato de Zlatko Tišljar, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj aŭtoro de la esploro sur kiu baziĝas la Zagreba Metodo, Kroata Esperanto-Ligo gvidis la projekton en kiu partoprenis partneroj el Slovenio, Kroatio, Italio kaj Barato.

Ĉiu eŭropa partnero, t.e. la slovena, la kroata kaj itala, elektis po unu fabelon el sia nacia porinfana literaturo, kiu laŭ la projekto poste estis eldonita en Barato en la bengala lingvo. Analoge la barata partnero elektis porinfanan fabelon, kiu aperis samtempe en la tri antaŭe menciitaj eŭropaj landoj en ties laŭvicaj naciaj lingvoj.

La barata skipo, gvidata de Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA, elektis la fabelon “La vivo de Damoru” (en la bengala: “Damarucharit”) de la bengala aŭtoro Trailokyanath Mukhopadhyay. La libro aperis en la kroata versio sub la titolo “Damourov život”, en la slovena sub la titolo “Damorujevo življenje” kaj en la itala ricevis la titolon “La vita di Damoru”.

Zlatko Tišljar gvidis la slovenan skipon, kiu proponis la fabelon “Mi volis tuŝi la sunon” (en la slovena: “Hotel sem prijeti sonce”) verkita de Tone Partljič. La italoj elektis la fabelon de Vama (Luigi Bertelli) “Taglibro de Joĉjo Tempesto” (en la itala: “Il giornalino di Gian Burrasca”) kaj estis gvidataj de Brunetto Casini. “Wakajtapu” (en la kroata: “Wakajtapu”), kvankam bengalaspekta, estas la titolo de fabelo de la kroata aŭtoro Joža Horvat. Tiun ĉi verkon proponis la kroata skipo, kies korifeo estis Spomenka Štimec, kiu samtempe ludis la rolon de ĉefgvidanto de la tuta projekto.

Kiel menciite, la projekton ampleksas kvar librojn verkitajn en kvar diversaj lingvoj kaj ties koncerna tradukado. En ideala kazo, laŭ la postuloj de la projekto, tri tradukistoj estus necesaj: unu tradukisto por

tradukado de la bengala en la italan kaj de la itala en la bengalan, alia por tradukado de la bengala en la kroatan kaj de la kroata en la bengalan, kaj tria por tradukado de la bengala en la slovenan kaj de la slovena en la bengalan. La taskon trovi tradukistojn inter la bengala kaj la eŭropaj lingvoj tamen ne estas senpena. En tiaj okazoj, kiam ne ekzistas homoj kompetentaj por tradukado inter du certaj lingvoj, oni uzas ponto-lingvon kiel nerektan rimedon. Tio signifas, ke la tradukisto ne tradukas rekte el la originalo sed el traduko en lingvo, kiun li regas.

La rolon de ponto-lingvo nuntempe ofte ludas la angla lingvo, sed ĉi-foje tiun rolon transprenis la internacia lingvo Esperanto. Sekve, ĉiuj fabeloj estis tradukitaj en Esperanton aŭ speciale laŭ la postuloj de la projektoj aŭ iam antaŭe kadre de pli fruaj projektoj. La bengalan rakonton “La vivo de Damoru” esperantigis Malasree Dashgupta, la slovena “Mi volis tuŝi la sunon” aperis en esperanta traduko de Zlatko Tišljar en 1994, Umberto Broccatelli tradukis el la itala “La taglibron de Joĉjo Tempesto” en 2009, kaj la kroatan “Wakajtapu” esperantigis ankaŭ Zlatko Tišljar en 1989.

Siavice, ĉiu esperantlingva traduko estis transigita en la celatan nacian lingvon. Malasree Dashgupta plenumis la laŭdindan taskon (re-)traduki la esperantajn tradukojn de ĉiuj tri eŭropaj fabeloj en la bengalan. “La vivon de Damoru” el Esperanto transigis en la kroatan la juna Domagoj Vidović, en la slovenan Vinko Ošlak, kaj en la italan Massimo Acciai.

La tuta projekto aperis kadre de la kultura programo 2007-2013 de la Eŭropa Komisiono, kiu finance subtenis la entreprenon per 33 000 eŭroj kaj estis prezentita de Spomenka Štimec dum la brusela kulturfoiro “Kulturo moviĝanta”, kiun organizis la Eŭropa Komisiono kaj ties agentejo EA-CEA.

La iniciaton parte financis ankaŭ la Esperantic Studies Foundation. Ties vicprezidanto Mark Fettes partoprenis en la prezento de la kroata traduko de la bengala libro en Zagrebo la 17an de februaro, kie li substrekis la valoron de la entrepreno

ne nur pro la fakto, ke eblas per ĝi superi la lingvajn barojn, sed pro tio, ke kadre de la projekto estis farita esploro pri la problemoj kaj solvoj rilate la tradukarton de porinfana literaturo.

Finance kontribuis al la tuta afero ankaŭ la kroata ministrejo pri kulturo kaj la zagreba magistrato.

En la prezentado de la rezultoj de la projekto kaj la kroata versio de “La vivo de Damoru”, la 17an de februaro, okazinta en la urba zagreba biblioteko, partoprenis la ĉefgvidanto de la projekto, sekretario de Kroata Esperanto-Ligo kaj verkisto Spomenka Štimec, la iniciatinto Zlatko Tišljar, la tradukinto en la kroatan de la bengala fabelo Domagoj Vidović, la vicsekretario de la barata ambasadejo en Kroatio, Mark Fettes de Esperantic Studies Foundation kaj Ivan Andrejevič kiu prelegis pri la bengala literaturo kaj la aŭtoro de “La vivo de Damoru” Trailokyanath Mukhopadhyay. Inter la publiko elstaris la ĉeesto de la 95-jara Joža Horvat, aŭtoro de “Wakajtapu”, kiu per sia emocia interveno dankis la partoprenantojn en la iniciato pro tio, ke ili sendis lian literaturon al Barato kaj al la barataj infanoj.

En la sekva kaj lasta fazo la libroj estos dissenditaj al pluraj elementaj lernejoj en Barato, Kroatio, Slovenio kaj Italio, kie la lernantoj legos la tradukitajn verkojn kaj partoprenos en konkurso pri recenzoj pri la libroj. Oni antaŭvidas publikigon de la premiitaj recenzoj.

La originon de la projekto oni trovas en antaŭa iniciato de Kroata Esperanto-Ligo, kadre de kiu Maja Tišljar tradukis en Esperanton verkon de la kroata beletristo Ivana Brlić-Mažuranić “Mirindaj aventuroj de la metilernanto Hlapič” (en la kroata: “Ĉudnovate zgode šegerta Hlapića”). La traduko estis premiita en la Beletraj Konkursoj de UEA 1999 en Berlino en la kategorio Infanlibro de la jaro, kaj ekde tiam tradukita en plurajn lingvojn, inter ili en la bengalan.

Pliaj informoj estas atingeblaj en la TTT-ejo de Kroata Esperanto-Ligo: [esperanto.hr](http://esperanto.hr) □

# ALMAGRO AŬ LA PLEZURO ESTI GASTIGITA

JM Milla

Inter la 9a kaj la 11a de aprilo mi havis la plezuron partopreni Iberian Renkontiĝon 2010 en Almagro (Campo de Calatrava, Kastilio) organizita far EMAS. Mi diras plezuron ĉar tiu estas la plej grava sento kiu restas al mi kiam memoras pri la renkonto. Sed eble mi devus diri plezuraro, ĉar fakte tiu plezura sento estas la kuno de sinsekvaj anekdotaj plezuretoj kiujn mi ĝuis dum tri tagoj.

Vendredon matene la afero bone ekis per agrabla trajnvojaĝo el Barcelono dum kiu, bonŝance, filmomontrilo misfunkciis, helpante nin prefere okupi la tempon per interesaj babiladoj diverstemaj. Jen la unua plezureto, kaj estis nur la komenco.

Ĝus alvenintaj en Almagron bonvenigis nin organizanto forlasinta sian tagmezmanĝan teletron surtable. Li akceptis nin kaj akompanis al la restoracio, kie lia manĝo jam malvarmis, por inviti nin trinki kafon kiun ni plezure dankis.

De tie nia amfitriono akompanis nin al restaĵejo. Survoje li pardonpetis ĉar ĝi estis iom for de la urbo, sed tute ne pardonpetendis: temis pri modernaj ĉambroj en bela kampadejo kie simpatiaj homoj gastigis nin tute ĝentile. Mi konstatis ke ili eĉ aĉetis por ni novajn littukojn. Jen por mi unu el la vivplezuroj: dormi en lito kun littukoj tute novaj... Poste, dum nokto, reveni al la kampadejo piede estis agrabla promenado dum kiu ni, urbanoj viktimoj de luma poluo, ĝuis la kontempon de stelaro en nigra ĉielo.

La kongresejo estis belega antikva palaco de noblulo, nuntempe publika kulturejo, kaj tie okazis soleneta malfermo preskaŭ familia, gaja intervjuo por lokaj amaskomunikiloj, lingvo-kurso por komencantoj, gustumado de landa fromaĝo, ŝinko kaj vino kaj debato pri la nacia situacio (precipe de katalunaro) tute bone-tosa dum kiu la teleroj kun fromaĝo kaj ŝinko rondiris de mano en manon por ke oni povus havi la plezuron paroli kun buŝo plena.

Ankaŭ okazis tie ludo "Ĉu vi volas esti milonulo?", dum kiu per simplaj demandoj (iom post iom pli malfacilaj) kaj kun la helpo de kom-

putilo oni brile kaj amuzege partoprenigis nin kaj eĉ ebligis al kelkaj gajni milonojn!!

Oni vizitigis nin la urbeton trankvile promeneante kaj babilante kaj aranĝis viziton al fama antikva teatrejo (unu el la plej antikvaj en Kastilio, tie nomata "corral de comedias") kie aktoroj reprezentis teatraĵon celantan klarigi al la publiko la realon de teatro en la deksepa aŭ dekoka jarcento. Antaŭe la organizantoj sciigis la aktorojn pri la ĉeesto de esperantistoj kaj ili, tute simpatie kaj komplike, inkludis aludon al la internacia lingvo en sia tiutaga teatraĵo.

Ĉar sabaton vespere okazis futbolmaĉo inter Barça kaj Real Madrid, la organizantoj planis komunan vespermanĝon en salono kun televido. Tiel, simpatiantoj al unu aŭ alia teamo sidis apude, manĝis, babilis kaj fruis la futbalon tute amikece.

Oni planis ankaŭ ekskurson al humidejo Tablas de Daimiel, sed plimulto de la katalunoj tiam devis preni revenan trajnon. Tiu estis la sola plezuro kiu mankis al mi dum tiu renkonto. Bedaŭrinde, ĉar ĉi-jare la abundaj pluvoj akvigis la humidejon kaj la spektaklo devas esti eksterordinara.


Jen kialo por reveni al Kastilio, kun plezuro, kompreneble. □

JUAN JOSÉ VERA



**La teleroj kun fromaĝo kaj ŝinko rondiris de mano en mano, por ke oni povus havi la plezuron paroli kun buŝo plena**

**Antaŭe la organizantoj sciigis la aktorojn pri la ĉeesto de esperantistoj kaj ili, tute simpatie kaj komplike, inkludis aludon al la internacia lingvo en sia tiutaga teatraĵo**



